

Katolika sento

JARO 54a

U.E.C.I.



4

75



KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)



Anno 54° - 1975

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (MI)

Redattore per la
Voce Esperantista di Roma:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA
Poŝtĝirkonto 1-37638

Redattore
del Bollettino U.E.C.I.:
SIG. GLAUCO CORRADO
Via Palmanova 28
20132 MILANO

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO
Poŝtĝirkonto 3-7791

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

ABONKOTIZON
AL KATOLIKA SENTO
SACERDOTOJ POVAS PAGI
ANKAŬ PER CELEBRO
DE DU S. MESOJ,
PRI KIUJ ILI BV. INFORMI
P. JACOBITTI
AŬ PASTRO DUILIO MAGNANI
VIALE C. ZAVAGLI 73
RIMINI

Quota di abbonamento L. 2500

Abonkotizo italliroj 2500

KATOLIKA SENTO

n° 4

54^a jaro

Aprilo 1975

FIDELECO KAJ RECIPROKA SINDEDIĈO: PROGRAMO DE LA KRISTANAJ GEEDZOJ

Dum la celebrado de la jubilea Meso por la geedzoj en Sankta Petro la Papo faris la jenan paroladon al la dudek mil fideluloj ĉeestantaj en la Baziliko, dimanĉon la 13an de aprilo 1975.

Duobla motivo vekas en nia koro sentojn , profundajn kaj dolĉajn, en ĉi tiu momento. Unua: la dolĉa kaj forta impresoj, kiun lasis en ni la belega paĝo de la Evangelio de Luko, kiun ni ĵus aŭskultis; kaj al ni ŝajnas ankoraŭ, ke "ardas la koro en nia brusto", dum ni aŭskultadis la inspiritajn vortojn de la Skribo, la vortojn mem de Jesuo, kiuj ankoraŭ hodiaŭ alte resonas en la mondo, anoncitaj de la Eklezio. Dua: la okazo, kiu kondukis nin ĉi tien: nome, la beno al kelkaj paroĵ de novaj geedzoj, kiuj hodiaŭ, en ĉi tiu Baziliko de Sankta Petro, apud la Altaro de la Konfeso, en la spirita florado de la paska tempo de la Sankta Jaro, geedze kuniĝos, eĉ celebros ili mem la geedzan ceremonion, iĝitaj de Kristo ministroj de la "granda sakramento" (Ef. 5,32), dank' al la sacerdota ofico (Vd Lumen Gentium, 34), al kiu la bapto rajtigas la Popolon de Dio.

Du momentoj, du aspektoj, du sinsekvoj de nia hodiaŭa renkontiĝo: tro riĉaj kaj neelĉerpeblaj, por ke ni povu nin dediĉi al ili en taŭga maniero, eĉ se mal-



"...Tiuj disĉiploj de Emauso estas ni!
... Nur se ni havas amfajrerojn, la
okuloj malfermiĝas por rekoni lian ĉe-
eston, kaj la koro ekbrulas..."

longa, en ĉi tiu familia interparolo; tamen meritantaj sendube iun komunan serenon paŭzon de pripensado.

1. La sceno en Emauso, antaŭ ĉio. Tro konata, por ke, nur je ĝia aŭdo, ĝi ne veku en nia koro imagojn kaj memorojn jam familiarajn, kiujn la kristana arto ĉiutempa pritraktis privilegie en siaj mirindaj, vibrantaj, lumaj variaĵoj. Ĉu ne ŝajnas al ni, ke la dubo de la du disĉiploj estis iufoje ankaŭ nia? Ĉu ne ŝajnas al ni, ke nia kredo estis iufoje tro malmulta kaj malforta, kaj materia, kiel tiu de tiuj homoj senkuraĝigintaj, kiuj atendis la "liberigon de Izraelo" (Lk 24,21) en perspektivo nur surtera, ne komprenante, ke la Kristo "devis toleri ĉi tiujn suferojn por eniri en sian gloron" (Lk 24,26)? Tiuj disĉiploj de Emauso estas ni! Nur se ankaŭ ni havas orelojn por aŭskulti, kaj korojn por sekvi la Parolon de Kristo, jen li venas kun ni, li akompanas nin, iĝas nia amiko, nia kunulo laŭlonge de la vojo, nia kunmanĝanto ĉe la tablo de la frata karitato kaj ĉe la eŭkaristia komunio; nur se ni havas amfajrerojn, la okuloj malfermiĝas por rekoni lian ĉeeston (Lk 24,31), kaj la koro ekbrulas. "Ĉi tiu fajro - diras Sankta Ambrozio, komentariante la vortojn de la disĉiploj de Emauso - ĉi tiu fajro lumigas la intiman angulon de la koro".

Fratoj! la kredo kaj la amo igu vin rekoni kaj sekvi Kriston, ĉiam. Ĉi tiu estas la unua, evidenta, tamen tiom deviga, pripensado, al kiu nin invitas la Evangelio.

2. Kristo akompanas nin laŭ la vivovojo; sed kian pli bonan penson ni povas lasi al vi, karaj geedzoj, kvazaŭ provizon kaj nutraĵon kaj subtenon en la longa vojaĝo, kiun vi estas komencantaj kune? Vi reprezentas simbole antaŭ niaj okuloj, kiel antaŭ la tuta Eklezio, la sennombran aron da paroj, kiuj kun la beno de Dio, kiel vi ĉi-matene, metis la fundamenton de sia hej



ma Eklezio, kiel la Koncilio nomis la familion (Lumen Gentium, 11). Al vi, al ĉiuj junaj paroj, al ĉiuj kristanaj familioj: al ĉiuj, kiuj kun sia amo, altenlevita kaj transfigurita per la virto de la sakramento, estas en la mondo la ĉeesto kaj la simbolo de la reciproka amo de Kristo kaj de la Eklezio (Ef. 5,22-23), ni hodiaŭ ripetas: ne timu, Kristo estas kun Vi! Apud vi por transfiguri vian amon, por riĉigi ĝiajn valorojn, jam tiel grandajn kaj noblajn, per tiuj, tiom pli mirindaj, de sia graco; apud vi por igi firma, stabila, ne disigebla la ligilon, kiu vin kunigas en la reciproka sindonno de unu al la alia por la tuta vivo; apud vi por vin subteni meze de la kontraŭaĵoj, de la elprovoj, de la krizoj, certe okazontaj en la homaj realoj, sed certe ne - kiel volus iuj misaŭguraj pensmanieroj teoriaj kaj praktikaj - certe ne nesupereblaj, ne fatalaj, ne detruaj de la amo, kiu estas forta kiel la morto, kiu daŭras kaj postvivas en sia belega ebleco rekreiĝi ĉiutage, sendifekta kaj senmakula; apud vi por helpi vin venki la danĝerojn ne malrealajn de la egoismo, kiuj kaŝiĝas en la profundaj faldoj de la animo sekve de la origina peko, sed kiuj tamen estis venkitaj de la Kruco kaj de la Reviviĝo de Kristo; apud vi por sentigi al vi vian dignon de kunlaborantoj de Dio Kreanto, en la transdono de la netaksebla donaco de la vivo, kaj de Dio Providenca, en la viva prezentado de li antaŭ viaj gefiloj en la korinklinoj, en la flegadoj, en la zorgoj, kiujn vi sendube kapablos dediĉi al ili per tiuj elanoj de heroeco, kiujn bone konas la koroj de la patroj kaj de la patrinoj. Jes, fratoj, jes; vere "ĉi tiu sakramento estas granda: mi parolas pri Kristo kaj pri la Eklezio" (Ef. 5,32). Tion bone substrekis denove la Koncilio Vatikana II, kiam ĝi diris: "Kiel iam Dio venis renkonte al sia popolo kun la pakto de amo kaj de fido, tiel nun la Savanto de la homoj kaj Edzo de la Eklezio

venas renkonte al la kristanaj geedzoj kun la sakramento de la geedzeco; krome, li restas kun ili, ĉar, sam-kiel li mem amis la Eklezion kaj sin donis por ĝi, tiel ankaŭ la geedzoj povu ami unu la alian fidele, por ĉi-am, kun reciproka sindediĉo... kaj estu helpataj kaj fortigataj en la disvolvo de la supera misio de patro kaj patrino" (Gaudium et Spes, 48).

Tiel, fratoj, tiel: estu ĉi tiu via programo, estu ĉi tiu via ambicio: kun Jesuo iranta kun vi laŭ la penigaj kaj neantaŭvideblaj vivovojoj; kun Jesuo sidanta ĉe la tablo de via ĉiutaga pano, krude sed serene gajnata, vi povu fari el via duopa ekzisto lumon, mision, benon. Tion ni alvokas por vi, kaj por ĉiuj kristanaj geedzoj, dum la Meso; kaj ĉi tiu estas la bondeziro, kiun ni faras al vi kun profunda amemo patra.

trad. C.M.-P.

[illegible]

ALIFORMIGŌ

Dominus sustinet omnes qui cadunt,
et erigit omnes depressos.

Ps. 144, 14.

Estas aferoj, kiujn al neniu
mi diri povas,
kiujn
sole al Vi - freneza pro malespero -
mi preskaŭ krie parolas.
Sed dum mi supozas: Vi min ne aŭdas,
pri mi ne plu zorgas,

neatendite
mi eksentas
Vin profundigantan en la animon lacan,
kiu tiam baldaŭ
trankviliĝas, ĝoja.
Tio estas kazoj, kiujn nur mi konas:
mi sidas tiel, per ĉeesto Via surprizita,
per ĝi ĝisfunde aliigita,
kaj dum sen vort' mi laŭdon al Vi diras,
tra kor', tra vejnoj jam vibras freŝa fort',
fontanta el anim', ho Dio, de Vi plena.

Jozefo Riječnin

[illegible]

36^a IKUE - KONGRESO

"Renoviĝo kaj Repaciĝo"

Lundon, 11-VIII

posttagmeze

Alveno de la kongresanoj al "Domus Pacis". Disdono de la dokumentoj.

Ekloĝigo.

h. 19

S. Meso kunccelebrata

20

Vespermangô

Interkona vespero

Mardon, 12

7,30	Kunsido de la Estraro
9,30	Solena inaŭguro. Malfermaj kantoj. Bonvenigo fare de la Prezidanto de IKUE. Festparolado de Prof. Henriko Paruzel. Salutoj de la reprezentantoj de la naciaj IKUE-Asocioj. Kantado de la ensemblo "Evangelia Ritmo".
12	Komuna tagmanĝo Liberaj ekskursoj
18,30	Kuncelebrado
20	Vespermanĝo
21	Kultura programo. Prelego I: "Sankta Jaro kaj IKUE".

Merkredon, 13

7,30	Fakaj kaj laborkunsidoj
9	Ekskurso gvidata tra la Urbo. - S. Petro kaj Muzeoj Vatikanaĵ.
14	Vizito de la Baziliko S. Maria Maggiore. - Ĝenerala foto antaŭ la fasado. Vizito al la tombo de la Servantino de Dio, Maria Ter. <u>L</u> edokowska. - Kuncelebrado en S. Prakseda
20	Vespermanĝo
21	Vespera programo. Prelego II: "Renoviĝo kaj repaciĝo".

Jaŭdon, 14

7	Tuttaga ekskurso al Monte Cassino. (Velletri - Frosinone ...)
9,30	Kuncelebrado en la Abateja Preĝejo - Vizito de la Pola Tombejo. Komuna tagmanĝo ĉe loka restoracio - Reveno al Romo
20	Vespermanĝo
21	Distra Vespero. Lumbildoj de P. Ciccanti.

Vendredon, 15

8	Meditado
8,30	Vizito al la Bazil. de S. Paŭlo. Vizito de S. Johano en Laterano. Kuncelebrado.
16,30	Jubilea Indulgenco. "Scala Santa" S. Maria Maggiore: Papa alparolo dum la Diservo honore al la Ĉielenprenita.
20	Vespermanĝo
21	Varioplena artista programo. Prelego III: "Pilgrimado al <u>K</u> risto pere de lia Eklezio".

Sabaton, 16

8	Kuncelebrado
9	Fermo de la Kongreso

ALIGIS AL LA 36^a IKUE-KONGRESO EN ROMO :

187 Płachta S.	210-215 "Evangelia Ritmo"
188 Boklak H.	216 Byrski S.
189 Krnitwagen G.	217 Gaston I.
190 " Schooff T.	218 Sancho-R.S.
191 Di Prinzio R.	219 Pisoni G.
192 Colas R.C.	220 Włodarczyk B.
193 Nikiforow K.	221 " Halina
194 " Zawadzka M.	222 Cielinska A.
195 " Zofia	223 Wielgus S.
196 Michau J.	224 Ziołek A.
197 Lecocq R.	225 Lecocq L.
198 Pietryka A.	226 Pitotti J.
199 Martinez M.M.	227 Oreb I.
200 " M.T.C.	228 Opsomer S.
201 Csepella A.	229 Wirostek D.
202 Szakacs J.	230 Kujawska D.
203 Stricki F.	231 Mikstein I.
204 Velebit J.	232 " W.
205 Viti G.	233 Łotocki S.
206 Verbeke R.	234 Rogocz H.
207 Tercinod M.L.	235 " K.
208 Goudé L.	236 Zawada J.
209 Pinthon P.J.	237 Marmou R.J.

Ĝis nun: 237, el kiuj: 129 el Pollando; 21 el Romo; 39 el aliaj italaj urboj; 14 el Francujo; 7 el Nederlando; 5 el Germanujo, Hispanujo, Jugoslavio; 4 el Hungarujo; 2 el Belgujo, Aŭstrujo, Usono; 1 el Ĉeĥoslovakio, Norvegujo.

.....

LA BAZILIKO S. PAŬLO EKSTER LA MUROJ, aŭ "Ba-
sìlica Ostiense", estas la plej vasta preĝejo en Romo,
post S. Petro. Tie Paŭlo 6a volis efektivigi kelkajn e-
tapojn de la Ekumena renkontiĝo kun la aliaj kristanaj
Eklezioj, kvazaŭ por peti helpon de S. Paŭlo, gvidanto
kaj majstro de la disvastigo de la unua sendivida Ekle-
zio. Ĉi tie okazis la historia brakumado inter la roma
Pontifiko kaj la Primaso de la Anglikana Eklezio. Apar-
te menciinde, ke en ĉi tiu sama templo, je 25 de janua-
ro 1959, alia Papo, la neforgesebla Johano 23a donis la
unuan anoncon de la 2a Vatikana Ekumena Koncilio, kiu
aperigis novan pentekostan periodon por la Eklezio.

La Baziliko S. Paŭlo estis unu el la kvar plej grandaj,
konstruitaj de Konstanteno (314 j.) sur la kapeleto sta-
rigita memore de la apostolo Paŭlo, ampleksigita poste
de Valentiniano 2a (386 j.), de Teodozio kaj de Hono-
rio 5a (5a jarc.).

La triumfa arkaĵo, ornamita per belegaj mozaikoj deve-
nintaj de maŭzoleo de Galla Placidia (5a jarc.), estas
tio, kio restis ne difektita el la antikva Baziliko, de-
truita preskaŭ tute pro fajrego dum la nokto 15-16 de
julio 1823. La rekonstruado, komencita de Leono 12a,
estis plenumita post preskaŭ tridek jaroj de Pio 9a en
1854. Solena kvarportika korto kun 150 kolonoj kaj la
statuo de S. Paŭlo (verko de Canonica), gvidas al la ba-
ziliko, sur kies fasado brilas grandaj mozaikoj.

La interno trafas pro la majesto de la kvinnaŭa templo
kun 80 granitaj kolonoj. Karakterizas ĝin, laŭ la tuta
perimetro de la Baziliko, la mozaikaj portretoj, sinse-
kvantaj super la kolonoj, de ĉiuj papoj ekde S. Petro
ĝis la nuna. Flanke de la centra pordo estas kvar ala-
bastraj kolonoj, donitaj de egipta Vicreĝo al Gregorio
16a.

La Kristo benanta kun la Evangeliistoj kaj la 24 maljunuloj de la Apokalipso regas sur la Baziliko el la alto de la Triumfa arkaĵo. Malsupre la figuroj de la sanktaj Petro kaj Paŭlo.

Sur la ĉefa altaro la gotika tabernaklo de Arnolfo di Cambio. Sub la konfesa altaro kuŝas la korpo de la Apostolo, kies kapo tamen, kune kun tiu de Sankta Petro, estas gardata en la Laterana Baziliko. La belega paska kandelabro, kiel ankaŭ la klaŭstro, estas verkoj de la samaj artistoj Vassalletto, kiuj ornamis la klaŭstron de la Laterano. La mozaikoj de la absido estas laboro de veneciaj artistoj ĉirkaŭ 1220.

Belegaj ankaŭ maldekstre de la absido estas la Kapeloj dediĉitaj al S. Stefano kaj al la Krucumito, kiun S. Brigita, laŭ la rakonto de ŝia vivo, aŭdis parolantan al ŝi.

Dekstre estas la kapelo de S. Laŭrento, kun triptiko de la 5a jarcento kaj de S. Benedikto, kun dekdu romiaj kolonoj devenintaj de Vejo. Ĉe la altaro de la dekstra ekstremo estas mozaiko de Giulio Romano, figuranta la kronadon de Maria, laŭ desegno de Rafaelo.

Oni devas ĉi tie memorigi, ke la loko, kie la Apostolo estis martirigita, ne estis ĉi tie, nome ĉe la Ostiensis Vojo, sed, laŭ la tradicio, kelkajn kilometrojn antaŭe, laŭ la Vojo Laŭrenta, en loko nomata "Acque Salvie". Ĉi tie estis konstruitaj, memore de la Martiro, tri preĝejoj : Sanktaj Vincento kaj Anastazio (7a jarc); Sankta Maria "in Scala Coeli" kaj S. Paŭlo de la Tri Fontanoj, ĉar laŭ la tradicio, tri fontanoj ŝprucis en la tri lokoj, kie lia kapo resaltis. Ekde 1868 la tereno apartenas al la Trapistoj.

LA BAZILIKO S. JOHANO EN LA TERANO estas la katedralo de Romo kaj la patrino de ĉiuj preĝejoj de la mondo, figuro de la roma kaj de la universala Eklezio,

kiuj estas kunigitaj en la persono de la sama Pontifiko. En la 313 jaro imperiestro Konstanteno donacis ĉi tiun palacon kaj terenon, apartenintajn al la familio de la Lateranaj Plaŭzoj, al Papo Sankta Melkiado, por ke ĉi tie li konstruu la preĝejon kaj rezidejon de la romaj Epi-skopoj, t.e. de la Papoj.

La unua Baziliko estis dediĉita al la Savanto. Plurfoje endanĝerigita (en la 5a jarcento per la Vandaloj) aŭ de-truita (en 896 per tertremo), ĝi estis konstante ripari-ta aŭ rekonstruita de la Papoj kaj en la 10a jarcento de-diĉita al la sanktuloj Johano la Baptisto kaj Johano E-vangeliiisto. En 1300 Bonifaco 8a ĉi tie proklamis la u-nuan Jubileon. Post la transloĝiĝo de la Papo al Avinjo-no kaj du fajregoj, kiuj entute detruis la Bazilikon, ĝi estis rekonstruita unufoje de Urbano 5a kaj denove en la 17a jarcento de Inocento 10a, antaŭvide de la Sankta Jaro 1650. La ĥodiaŭa aspekto de la Baziliko estas ĝe-nerale ankoraŭ tiu, kiun donis al ĝi la granda arkitekto de Inocento 10a, Borromini.

La majesta fasado kun siaj 14 statuoj de sanktuloj kaj apostoloj, estas de la tempo de Klemento 12a. Leono 13a en 1885 plilongigis la absidon kaj refarigis la mo-zaikojn, laŭ desegnaĵo de la malnovaj.

Solena kaj grandioza estas la interno de la Baziliko, 130 metrojn longa. Inter la kolonoj, la statuoj de la A-postoloj gvidas la rigardon de la fideluloj al la mozai-ko de la absido, montranta figuron de Jesuo, la Savan-to, al kiu estis dediĉita la unua Baziliko; kaj meze de la transepto leviĝas la gotika papa altaro, tre valora pro la relikvoj, kiujn ĝi gardas, nome, supre, pro la kapoj de la apostoloj Petro kaj Paŭlo; kaj sube, pro la unua ligna altaro, kiu, laŭ la tradicio, estis la sama, kiun uzis la apostolo Petro.

En la Baziliko multaj Papoj estas sepulkitaj, kaj monu-mentoj memorigas ilin.

En la granda kapelo maldekstre estas bela tabernaklo, ornamita per valoraj ŝtonoj. Kaj supre, reproduktaĵo en orumita bronzo, de la Vespermanĝo de Leonardo, gardas relikvojn de la tablo, kiu apartenis al la lasta vespermanĝo de Jesuo.

Apud la preĝejo estas aparte vidinda la klaŭstro inter 1222 kaj 1230 de marmoristoj Vassalletto patro kaj filo. Temas pri kvadrata ĉarma korto, ĉirkaŭata per loĝioj kaj ornamita per elegantaj duopaj kolonetoj spiralformaj, kanelitaj, glataj aŭ ornamitaj per mozaikaj frisoj.

La Baptejo de S. Johano en Laterano troviĝas dekstre de la flanka fasado. Starigita de Konstanteno sur la banejoj de lia palaco kaj riparita post tertremo, ĉirkaŭ la 432 jaro, ĝi dum longa tempo estis la unua baptejo de Romo. Poste ĝi fariĝis modelo por ĉiuj aliaj baptejoj. Laŭ la legendo en ĝia bazalta kuvo mergiĝis Konstanteno por ricevi la bapton.

Maldekstre de la flanka enirejo estas la Laterana Palaco, rezidejo de la papoj ekde la donaco de Konstanteno ĝis la transloĝiĝo al Avinjono. La aktuala palaco estas laŭ desegno de Fontana. Hodiaŭ ĝi estas sidejo de la Kardinalo-Vikario kaj de la Roma dioceza Kurio. En la sama placo stariĝas egipta obelisko el granito, 74 metrojn alta (kune kun la piedestalo).

Je mallonga distanco antaŭ la enirejo de la Laterana Palaco troviĝas la "Sankta Ŝtuparo". Laŭ antikva tradicio, S. Helena, patrino de Konstanteno, transportigis al Romo el Jerusalemo ŝtuparon, kiun supreniris Kristo dum la pasia tago. Ĉi tiu ŝtuparo, aparteninta al palaco de Poncio Pilato, konsistas el 28 marmoraj ŝtupoj, kovritaj per ligno, por eviti eluzon kaŭze de fideluloj, kiuj ĉiam multnombre supreniras ĝin genue. Piede de la ŝtuparo estas du marmoraj grupoj de skulptisto Ignaco Jacometti figurantaj: la kison de Judaso kaj "Ecce Homo" (Jesuo montritan de Pilato).

Supre de la ŝtuparo estas kapelo de la Sankta martiro Laŭrenco. Tra krado oni povas vidi la internon de la "Sankta Sanctorum" nome, la kapelo de la relikvoj, persona preĝejo de la papoj en la malnova Laterana palaco, ĉi tien translokigita ĉe la Sankta Ŝtuparo, de arkitekto Fontana, laŭ ordono de Siksto 5a en la 16a jarcento.

ROMA ESPERANTA VOĈO

n° 138

ABONIS KS-on 1975 (4a listo):

Aosta: M.L.Tercinod; Bolonjo: E.Casagrande; E.G.; Castellazzo B.(AL): G.Carassa; Catania: G.Zappulla; G.Bruno; E.G.; Cittadella (PD): D.Fabris; Ĝenovo: G.B.Briano; P.Rizzo; Gorizia: M.Di Maso; Mantova: D.Zacché P.; Mezzolombardo (TN): P.Dao; Milano: E.Chiorboli; V.Dall'Acqua; Centro E. Montecchio(RE): D.Conti; Napolo: A.Jacobitti; Padovo: P.Tammone; Parma: E.Gruppo; Pisa: E.Gruppo; Ravenna: A.Duranti; Rieti: J.Pitotti; Rimini(FO): C.Ceccarelli; Romo: G.Viti; A.Antonelli; I.Galiardi; Santarcangelo di R.(FO): A.Gambut; Sarezzano(AL) G.Barbieri; Savigliano: M.Dogliani; M.Mariano; Venecio: M.Drago; A.Capitano; Veron: A.Vallotto; Belgujo: S.Opsomer; Finlando: R.Kontula; Francujo: R.C.Colas; J.Michau; R.Lecocq; R.Verbeke; R.Marmou; L.Goudé; P.J.Pinthon; M.Pierru; Hispanujo: M.Martinez; S.Sancho-R.; F.De la Puen-

te; Hungarujo: J. Szakàcs; Jugoslavio: F. Stricki; I. Oreb; Kolombio S. A.: J. Velasquez; Meksikio: J. Claramunt; Nederlando: G. Krnitwagen; Pollando: H. Boklak; K. Nikiforow; T. Nowakowski; I. Sygnarski; S. Byrski; A. Cielinska; Z. Debska; M. Schwarzenberg; S. Wielgus; A. Ziołek; D. Wyrostek; D. Kujawska; W. Mikstein; S. Łotowcki; H. Rogocz; I. Zawada; Portugalujo: A. De Moure; Usono: G. Harabagiu.

FERVORA RESPONDO AL LA Jubilea alvoko. Ĉiutage viciĝas pilgrimantoj al Romo, el ĉiuj mondpartoj: en la aŭdienco tago ne plu sufiĉas por akcepti ilin la grandega salono, tiucele kreita apud la baziliko, ne plu sufiĉas la plej vasta templo de la kristanaro, S. Petro; la Papo devas doni eĉ tri grandajn aŭdiencojn samtage; kaj en la lastaj dimanĉoj, por aŭskulti lian vorton adresitan de la fenestro de lia studejo, pli ol centmil "romei", la rom-irintaj pilgrimantoj, plenigis la Sankta Petro-placon.

KVALIFIKITA REPRESENTADO de la religio Ŝintoa, gvidata de Respektinda Muneyoshi Tokugawa, Plejalta Sacerdoto de la Granda Templo de Ise, estis akceptita de la Sankta Patro. Ĉi tiu estis, praktike, la unua oficiala kontakto de la katolika Eklezio kun la plej elstara aŭtoritato de Ŝintoo. Kune kun la Resp. Tokugawa estis Honor. Yasuo Shinoda, Granda Sacerdoto de la templo Atsuta, gvidanto de la Delegitaro, kaj dudek kvar ŝintoaj sacerdotoj. La Papo salutis la gastojn: "Respektindaj superaj Estroj de la Ŝintoa Religio - li diris -, Ni ĝojas hodiaŭ akcepti en ĉi tiu sidejo, centro de la Katolikismo, vin ĉiujn, kvalifikitajn reprezentantojn de Ŝintoo, kaj esprimi al vi nian sinceran dankon por via montrita deziro viziti nin. Ni agnoskas kaj alte taksas la Valorojn de religiaj kaj moralaj sentoj, ki

ujn via religio transdonis dum la kuro de la historio al la kulturo kaj al la japana civilizacio. Aparte plaĉas al ni mencii vian devontiĝon por la sincereco kaj korpureco, kaj vian idealon vivi harmonie kun homoj kaj kun naturo. Ni deziras vastigi ĉi tiun saluton kaj sinceran estimon al la tuta ŝintoista kolektivo. Ĉi tiu renkontiĝo estas esprimmaniero de la zorgo de la katolika Eklezio akceli rilatojn kaj dialogojn kun la religioj por pli bona interkompreno kaj amika kunlaboro cele al la paco kaj al la pliigo de la spiritaj kaj moralaj valoroj inter la homoj. Estu permesate al ni deziri al vi feliĉan restadon en Romo, kaj ke estu por vi kontentiga fonto via vizito al Sankta Petro, celo de multnombraj pilgrimantoj el ĉiuj mondpartoj. Ni deziras al vi ĉiuj kaj altiuj, kiuj estas de vi reprezentataj, abundon de prospero kaj Paco!"

Ŝintoo, laŭ japanaj registaraj statistikoj, havas 70 milionojn 321.823 adeptojn, 83.733 templojn kaj 77.858 sacerdotojn. La vorto "Ŝintoo" signifas laŭvorte "vojon al Kami". Kami signifas Dion, sed ĝia senco restas nedifinita. Fakte, la "Kojiki", japana mitologio kaj samtempe sankta ŝintoa libro, montras plurajn diversaspektajn diojn, el inter kiuj elstaras unue Amaterasu-Omi-Kami, diino de la suno kaj prapatrino de la imperiestroj. Ŝintoo ne estas religia doktrino, kiel, ekz. Budhismo estas instruo de Budho. Ĝi akceptas ĉian kredon je Kami, la praktikajn kutimojn konforme al la penso de la Kamioj kaj la spiritan vivon devenantan de kulto al la Kamioj kaj kunice kun la Kamioj. Pro tio por la adorantoj de la Kamioj, Ŝintoo estas kolektiva nomo, kiu entenas ĉiujn kredojn (kulton de la naturo, de la spiritoj, de la prapatroj, de la imperiestroj, ktp., kiuj estas entenataj en la koncepto de Kami. Laŭ sia ĝenerala senco Ŝintoo estas multe pli ol nura religia kredo; ĝi estas tuto da sintenoj, ideoj kaj ag-

manieroj, kiuj dum pli ol 20 jarcentoj eniĝis profunde en la vivon kaj en la kulturon de la japana popolo.

Tiel Ŝintoo estas ne nur persona kredo je Kami, sed ankaŭ socia vivo laŭ la sento aŭ volo de la Kamioj, kiu montriĝis dum la evoluo de la japana historio, fandante plurajn influojn etniajn kaj kulturajn, indiĝenajn kaj fremdajn (kiel budhismo kaj konfuceanismo) kaj efektivigante la nacian unuecon sub la imperiestra familio. Ĝi estas vera esprimo de la japana spiriteco kaj de la soci-kultura vivo de la popolo.

PER SOLENA KUNCELEBRADO estis inaŭgurata en la preĝejo de la Milicio de Maria la Senmakula, (Via Laurentina, ĉe EUR), la maria ekspozicio tutnacia, organizita de la "Sankta Kunligo", okaze de la Sankta Jaro zorge de sac. Aleksandro Vinciotti, kun helpo de aliaj sacerdotoj, precipe de la Minoraj Konventaj Fratoj, kiuj estras la internacian centron "Milicio de Maria, la Senmakula". Kard. Pietro Palazzini, kiu kuncelebris kun 20 rektoroj de la plej famaj italaj sanktejoj dediĉitaj al Maria, en la homilio diris, ke "la malpermeso de la hebrea religio bildigi figuron de Dio, estis aboliciita en la Nova Testamento, ĉar la Filo de Dio surpronis homan naturon. Kaj, ĉar ĝi estis kunigita hipostaze al la sama dia persono, ankaŭ la korpo de Kristo povas kaj devas esti adorata. Kaj samkiel ĝi povas esti reproduktata kaj kultata, analoge, povas esti reproduktataj kaj honorataj la bildoj de tiuj, kiuj rilatis al Kristo fizike aŭ spirite. Kaj antaŭ ĉiuj tiu, kiu estis Patrino de Dio, kiu plej intime fizike kaj spirite rilatis al Kristo, fariĝinte lia plej perfekta bildo. Kompreneble, la honorado celas ne la elementan materion, sed tion, kion ĝi montras. Sed por la homo, sensa estaĵo, estas pli facile atingi la spiritan figuron pere de la videbla bildo.

Pri la trajtoj de la Virgulino - aldonis la Kardinalo - certe neniam reproduktitaj dum ŝia surtera vivo, ne ekzistas unika tipo. La ikonografia solvo, kreita de la popola pieco, ne povis esti frukto de realisma portreto, kiu mankis.

Tiel la artistoj, konsiderante ke la plej bela spirita kreitaĵo devis aparteni ankaŭ al la plej bela fizika aspekto, ĉar ĝi estis ĉefverko de Dio, klopodis reprodukti la plej eble belajn figurojn de Maria". La plej malnova bildo de la Patrino de Dio troviĝas en la katakomboj de Priscila. De Rossi, kiu unua eldonis en 1863 "Kronologion de elektitaj Maria-bildoj en la romaj katakomboj", reliefigas, ke la prakristana arto akcentas unue la dian patrinecon, dogman veron, kiu estas ĉe la bazo de ĉiuj privilegioj de la tre sankta Virgulino. La kardinalo revuis la evoluon de l'arto dum la sinsekvaj jarcentoj, montrante kiel la senkompara maria beleco celita de la artistoj, akcelis eksterordinare la progreson de la perfekteco en ĉiu branĉo de l'arto. "Al la pilgrimantoj de la Sankta Jaro - konkludis la Kardinalo - Romo povas hodiaŭ doni la plej belan kolekton pri la vizaĝo de Maria, laŭ la riĉa, ĉiam varia, seninterrompa tra la jarcentoj, produktado de l'arto; de Maria, patrino de Jesuo, de la Eklezio, Patrino de ĉiu el ni".

La elmontro enhavas preskaŭ mil bildojn, ordigitajn laŭ 18 standoj. Kaj en kapelo proksima al la ĉefa altaro, ĉiutage estas ekspoziciata la "taga Madono", t.e. unu el la tiom multaj bildoj, honorataj en preĝejo, por ricevi la devotan omaĝon de la pilgrimantaro.

El la katolika Eklezio

JE LA 26a DE JANUARO oni celebris en la mondo la "Ta

gon kontraŭ la lepro". Ĉiukredaj kaj ĉiukondiĉaj homoj estis alvokataj kontribui por ĉi tiu paca milito kontraŭ malsano, kiu, spite de la grandaj progresoj faritaj en medicino ankaŭ rilate al kuracado de ĉi tiu plago, ne povis esti ankoraŭ venkita. Ĉi tiu celo estas kara al la kristanoj, ĉar Jesuo tre kompatis tiujn suferantojn forpuŝitajn de ĉiuj kun hororo, kaj per sia dia aŭtoritato li plurfoje resanigis ilin eĉ amase. Fakte per la lepro Jesuo volis montri al ni figuron de la danĝero eĉ pli granda, kiu estas peko por animo. Kaj la Eklezio, ricevante la heredaĵon de Kristo, ne nur ĉiam celis la savon de la animoj, sed ankaŭ klopodis kun senmezura karitato por tiu de la korpoj.

Jen kelkaj ekzemploj: la kapucenoj en la 58 misioj, pri kiuj ili zorgas, kreis 28 leprulejojn. En la leprulejo Sankta Francisko de Madagaskaro, laboras aŭstria, francaj kaj italaj kapucenoj. Ĝi konsistas en vilaĝo kun domoj, lernejoj, hospitalo kaj kapelo. La vilaĝo estas ĉirkaŭata per kampoj kulturataj de la lepruloj mem. Ĉirkaŭ 200 personoj laboras ĉi tie kaj kontribuas al la memfinancado de l'entrepreno. Ĉiujare oni atingas ĉi tie de 50 al 80 resaniĝoj. En Brazilo, ĉe San-Salvadoro, la lepruloj estas kuracataj en registara hospitalo. Sed, ĉar eĉ post resaniĝo, ili estas ĉiam forpelataj de la socio, la franciskano p. Benjameno, helpata de la "Karitataj Volontuloj de Verono" organizis kursojn por instruo kaj profesia trejnado, kiu donas vivrimedojn al multaj. Inter la kuraĝaj helpantoj, nome de Kristo, al tiuj suferantoj, ne malmultaj estis viktimoj de tiu terura infekto. En Birmanio, kiam la Ĝenerala Vikario de la Kengtung-a Diocezo, revenante de vizito al leprulejo, estis forprenita kiel garantiulo de rabistoj, estis la lepruloj mem, kiuj postkuris la rabistojn, sieĝis ilin, kaj per sanga batalo sukcesis savi la malliberigiton, kvankam grave vunditan.

ĈU ESTOS SANKTIGATA LA "gaŭĉa" parokestro? La argentina sacerdote José Gabriel Brochero, naskiĝinta ĉe Kordovo de Argentino en 1840, kutime konata ki el la "gaŭĉa parokestro", verŝajne estos honorata sur la altaroj. ("Gauĉo" estas la konata ĉevalbredisto de la pampoj). Destinata vic-parokestro de Villa del Transito, patro Brochero laboris kiel pastro dum kvardek jaroj . En tiu montoriĉa regiono li konstruis preĝe -
jojn, infanĝardenojn, lernejojn. Eĉ post kiam li estis elektita kanoniko, li daŭrigis sian apostolan kaj soci an agadon. Lia granda boneco por la terlaboristoj, al kiuj en siaj predikoj li paroladis per gaŭĉeska ĵargono, meritis al li la titolon "gaŭĉa parokestro" pri kiu li fieris. Ankaŭ la argentina kino memorigis lin per filmo nomata "El cura Gaucho". Lia beatiga proceso intertempe pluiras.

VIENO. Preskaŭ 3.000 estas en Aŭstrujo la junuloj, kiuj vizitadas la institutojn gvidatajn de la "Fratoj de la Kristanaj Lernejoj". 6 estas tiuj institutoj, kiuj kovras la tutan arkon de la instruado, ekde la elementa ĝis la plej alta mezgrada lernejo. La plej granda troviĝas en Strebersdorf, ĉe Vieno, kaj ĝin vizitadas pli ol 600 lernantoj. Kaj pli ol 200 el ĉi tiuj estas gastigitaj en porstudentaj domoj de la sama kongregacio.

BRAZILO. Miŝiisto de PIME, P. Cesare De Florio, el diocezo de Pistoia (Italujo), ĵus ricevis honorcivitanan titolon de urbo Manaus, en la brazila Amazonio. P. De Florio laboras en Manaus ekde 6 jaroj kiel parokestro de S. Maria de la Gracoj. Dum mallonga tempo li fondis socian centron por asisto al familioj, ludparkon por infanoj, komunumajn kursojn kaj profesian lernejon, kiu ricevis 115 knabojn. Ĉi tiu lernejo, kun helpo de la Ŝtataj sociaj Servoj kaj de itala asocio de Pi-

stoia instruadas pri pluraj metioj, krom pri brazila kulturo, pri higieno, sanstato kaj religio; memfinanca persia laboro, ĝi estas direktata de "Komunuma Konsilio". La loka presajaro inspiris kaj apogis la asignon de ĉi tiu oficiala honoratesto al P. De Florio, jam tre konata en la urbo.

FRANCUJO. - Kuna alvoko favore al la Ortodoksa Teologia Instituto "Sankta Sergo" de Parizo estis lanĉita de kard. Marty, prezidanto de la franca episkopa konferenco, de Jean Courvoisier, prezidanto de la protestanta Franca Federacio kaj de Mons. Meletios, prezidanto de la Franca Interepiskopa Ortodoksa Komitato. La instituto, kiu de mallonge atingis siajn 50 jarojn, trairas malfacilan finanĉan momenton. En la mesaĝo oni invitas la fidelulojn kontribui malavare por monkollekto favore al la konata studocentro, en kiu formiĝis ĝis nun 265 sacerdotoj kaj 26 ortodoksaj episkopoj.

POLLANDO. - Ne komuna teatra trupo estas en la porpastra seminario de Plock. Ĝiaj studentoj, fakte, laŭ 50-jara tradicio, ne nur zorgas pri siaj ordinaraĵoj devoj, studado, religia formiĝo, preparo al la pastra misio, sed ankaŭ sin dediĉas al artaj reprezentaĵoj, ligitaj al liturgiaj festoj aŭ al celebros de datrevenoj, kiel tiuj de S. Tomaso de Akvino aŭ de la pola S. Stanislao Kostka. Ilia jam vasta repertuaro tiamaniere riĉiĝas kaj perfektiĝas ĉiujare. Dum la ĵus pasinta jaro la seminarianoj de Plock prezentis scenon, titolitan: "La pasiono de la 20a jarcento", kiu akiris multajn favorajn konsentojn. La verko, riĉa de drameca sento, reliefigis la realon de l'homo, kiu serĉas sendian feliĉon, kun nur miraĝaj rezultoj, kaj la renovigitan krucumadon de la dia Vorto, efektivigitan ĉifoje sur la ŝtalkonstruaĵoj de la 20a jarcento.

.....

DAL MONDO ESPERANTISTA

ITALIA. - PREMIO LETTERARIO "LUIGI MINNAJA"
Per onorare la memoria dell'esperantista e poeta Luigi Minnaja, la rivista culturale "Tempo sensibile" bandisce un concorso per uno scritto, anche sotto forma di articolo, che sia stato pubblicato su un quotidiano o periodico italiano nel periodo 1° agosto 1974 - 31 luglio 1975. Il tema deve riguardare il problema della lingua internazionale con preferenza verso i suoi aspetti culturali.

1° premio £. 300.000

2° premio £. 150.000

3° premio £. 50.000

Far pervenire 5 copie del giornale pubblicante a "Tempo sensibile" - Casella postale 132 - 28100 Novara - con allegata adesione autografa dell'Autore ed indirizzo leggibile.

ITALIA. - Il 31 marzo è stata inaugurata a Pallanza una fontana che ha ricevuto il nome in lingua Esperanto "La mirinda fontano de Pallanza".

ITALIA. - Dal 15 al 19 settembre 1975 si terrà a Trieste il 46° Congresso Italiano di Esperanto. Tema del Congresso sarà "La pluralità delle culture e lingue internazionali".

"Topolino" n° 1010 del 6/4/75 e "Almanacco" n° 220 di aprile pubblicano: il primo un articolo sull' Esperanto ed il secondo un vocabolario Esperanto.

FRANCIA. - Per raggiungere Copenaghen, città del prossimo Congresso Universale di Esperanto, sarà organizzata una carovana francese dal 22 luglio al 7 ago-

sto. Il gruppo dei partecipanti attraverserà le città di Bruxelles, Antwerpen, Rotterdam, Brema, Hannover, Amburgo, Dortmund, Colonia, Aix-la-Chapelle, Lussemburgo e Reims.

DANIMARCA. - I bambini dell'età dai 6 ai 13 anni in grado di comprendere e parlare l'Esperanto, sono invitati a partecipare al 15° Congresso Internazionale che si terrà a Copenhagen per loro, quale sezione staccata del Congresso Universale. In questa occasione i piccoli partecipanti potranno vivere insieme, prender parte a giochi, escursioni, ed avere contatti con bambini di altri paesi. I bambini saranno organizzati in piccoli gruppi con un insegnante che farà loro da guida.

DANIMARCA. - Nella sua seduta dell'11 e 12 gennaio, il Consiglio della UEA ha deciso che il tema principale del Congresso e, di conseguenza anche una delle sue principali sedute di lavoro, sia la "Donna" in occasione dell'"Anno Internazionale della Donna", proclamato dall'ONU. Inoltre è stato scelto un secondo tema "Il ruolo dell'individuo nel movimento Esperantista", che sarà trattato secondo un nuovo stile di riunione. Dapprima lo discuteranno dei piccoli gruppi di lavoro, ai quali potranno partecipare tutti i presenti, sotto la guida di membri del Comitato della UEA. In seguito le loro conclusioni saranno presentate all'Assemblea. Lo scopo di una simile linea è di far intervenire il più alto numero possibile di congressisti alla discussione.

DANIMARCA. - Soltanto 4 congressi tra i 43 che avranno luogo in Danimarca nel 1975, saranno, secondo le previsioni, più imponenti del Congresso Universale di Esperanto, come si deduce dalla lista approntata dall'Ente Turistico Danese. Presumibilmente saranno quelli dei Chirurghi ortopedici, biofisici, della federazione mondiale per la salute mentale, per la dialisi e i trapianti.

.....